

Raportas Kubo 10 novajn kazojn de Covid-19 kaj neniun forpason



Havano, jun 19 (RHK) La nacia direktoro pri epidemiologio de la ministerio de publika sano de Kubo, dro. Francisco Durán, informis hodiaŭ ke je la fermo de tiu ĉi ĉi, oni konfirmis 10 novajn kazojn pozitivajn de Covid-19 por totalo de 2305 personoj kaj neniun forpasinton.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia 334 pacientoj. Aliaj 664 personoj estas kontrolataj hejme tra la baza sanato.

En tiu tago oni analizis 2543 samplajn, el kiuj 10 estis pozitivaj kaj la lando jam akumulas 146 276 studitajn samplajn kaj 2305 pozitivajn.

La novaj kazoj konfirmitaj estis kubanoj. El ili 5 estis kontaktoj de konfirmitaj kazoj. El ĉiuj konfirmitaj kazoj 88,5% estas kontaktoj de antaŭaj pozitivaj. Totalo de 161 estas venintaj el eksterlando. El la totalo konfirmita 53,9% estis sen simptomaj.

El la novaj kazoj 2 estis viro por 50,45% el la totalo. El la 2305 pacientoj diagnozitaj, 181 restas enhospitaligitaj kiel aktivaj kazoj. La nombro da forpasintoj entute estas je 85, kun indikilo de morteco je 3,69% sub la nivelo de la amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 18 rilate la mortec-indikilon en la regiono. Restas la nombro de du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj landoj kaj 2037 jam rekuperiĝintaj (17 pliaj hieraŭ). Unu paciento estas en kriza stato.

Ĝis sama dato la mondo akumulas pli ol 8 milionojn da kontaĵitoj pro tiu ĝi malsano kun indikilo de morteco je 5,39 % dum la amerika regiono havas iom pli ol 49,0% el ĝiuj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmitoj estas pli ol 3 milionoj. La nombro da forpasintoj en la regiono montras indikilon de morteco je 5,18%.

Spite al la favora evoluo de la malsano en Kubo la aŭtoritatoj insistas pri la bezono plu gardi la fizikan izoliĝon por eviti revigliĝon de la nova kronviruso. Pri tio la havanaj aŭtoritatoj pli strike kontrolas la sekurecajn regulojn epidemiologiajn.

En 13 kubaj provincoj oni ne raportis kazojn dum la lastaj du semajnoj kaj pro tio komenciĝis la rekuperiĝa etapo en tiuj provincoj, escepte en Havano kaj Matanzas, la solaj, kiuj daŭre raportas kazojn de Covid-19.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/226201-raportas-kubo-10-novajn-kazojn-de-covid-19-kaj-neniun-forpason>



Radio Habana Cuba